



LA VERDA TRISKELO

2 numéros par an - parution : printemps / automne
VT 52 - marto 2024



De beaux rendez-vous à venir en mars. Ne manquez pas ces occasions de nous retrouver autour de notre belle langue

Belaj rendevuoj venos en marto. Ne maltrafu tiujn okazontaĵoj por kunveni ĉirkaŭ nia kara lingvo!

Enhavo

Edito	p 2
La Federacio	p 2
Lokaj korespondantoj	p 3
Rilate al heredaĵo	p 4
Okazis kaj okazos	p 4-6
Anoncoj	p 7
Omaĝoj	p 8
Fremdaj Vizitintoj	p 9
Sumoo legado	p 11
Agendo	p 14

COTISATION 2024

– y avez vous pensé ? –

Même si vous ne suivez pas de cours,
même si vous n'êtes pas actif, soutenez
l'Espéranto et restez informé.

Adressez-vous soit à votre correspondant
local si vous adhérez à un club, soit à
Xavier Godivier (coordonnées p.4)
pour adhérer à la fédération
uniquement .

AUX INTERNAUTES

Site internet :

<http://bretonio.esperanto-france.org>

Pour vous inscrire à la liste de diffusion
Bretonio et ainsi recevoir des nouvelles,
plus fraîches et plus nombreuses,
envoyez un message vide à l'adresse :
bretonio-abono@esperanto-france.org

EDITO

Kia estonteco por nia federacio?

Nia baldaŭa membrokunveno en Saint Quay-Perros estos okazo de omaĝo al Gaby kaj al ŝia Esperanto agado. Ni ankaŭ parolos pri Maryvonne kiu adiaŭis nin antaŭ nelonge.

Tio estas parto de la vivo de asocioj, memori pri sia riĉa pasinteco, sed ni devas ankaŭ pensi pri la estonteco! Bedaŭrinde en plej multe de niaj lokaj asocioj mankas alveno de novaj membroj kaj novaj aktivuloj kiuj vigligu niajn agadojn. Ni devas do pripensi kion fari dum ni daŭre havas kelkajn fortojn kaj financajn rimedojn.

Ni ekzemple helpu al novbakitaj bretonaj Esperantistoj por trapasi ekzamenojn, por vojaĝi al kongresoj, kiel la baldaŭa Eŭropa Kongreso en Strasburgo en majo kun pli ol 400 partoprenantoj kaj bunta kultura programo.

Ĝis baldaŭ en Saint Quay-Perros por diskuti pri nia estonteco!

Xavier Godivier

Quel avenir pour notre fédération ?

Notre prochaine assemblée générale à Saint Quay-Perros sera l'occasion de rendre hommage à Gaby et à son engagement pour l'espéranto. Nous parlerons également de Maryvonne qui nous a quittés il y a peu.

Cela fait partie de la vie des associations de se souvenir de leur riche passé mais il faut aussi penser à l'avenir ! Malheureusement, dans la plupart de nos associations locales, il manque de nouveaux membres et de nouveaux actifs pour les animer. Nous devons donc réfléchir à ce que nous pouvons faire pendant que nous disposons encore de quelques forces et ressources financières.

Par exemple, aidons les nouveaux espérantistes bretons à passer des examens d'espéranto, à se rendre à des congrès..., tels qu'au prochain Congrès européen de Strasbourg en mai avec plus de 400 participants et un riche programme culturel.

À bientôt à Saint Quay-Perros pour discuter de notre avenir !

Xavier Godivier

FEDERACIO

Assemblée générale de la fédération Epéranto-Bretagne.

Dimanche 17 mars 2024 de 9h00 à 12h30

Salle d'animation Yves Guégan, Saint-Quay-Perros

9h00 Accueil

9h30 -11h mot du président, approbation des rapports d'activité et financier 2023, élection tiers sortant du CA

11h-12h30 Échanges sur les actions des clubs et projets 2024.

Repas sorti du sac puis :

Hommage à Gaby Tréanton.

14h -15h : exposition, vidéo-projection

15h -16h : témoignages

16h -17h : inauguration d'une pierre sculptée sur la tombe de Gaby

17h -18h : pot de l'amitié



Arango : Hélène Dubois - 06-68-15-32-62 - helene22dubois@gmail.com - 14 chemin de Land Gily 22300 Saint Michel en grève :

Prolegado Chantal Allen - 06-74-15-78-09 chantalallen9@gmail.com korektado Josette Ducloyer jducloyer@gmail.com

N'attendez pas la prochaine édition, envoyez vos articles à Chantal dès maintenant pour les voir apparaître dans le prochain VT (par courrier ou par internet).

Lokaj korespondantoj kaj kursoj.

22	Armor Esperanto	Murielle Caré	06 70 60 58 18	murielle.care(a)me.com
22	Saint-Brieuc	Laurent Peuch	06 89 86 12 97	ltpeuch(a)me.com
22	Plouézec	Jeanne Pouhaer	09 62 30 40 05	jeanne.pouhaer(a)orange.fr
22	Locquémeau-Cavan	Anne Desormeaux	06 04 01 27 64	anne_desormeaux(a)yahoo.fr
22	Lannion	Maja Mériaux	06 04 49 84 48	meriaux.family(a)wanadoo.fr
22	Pleudaniel	Pierre Cardona	06 99 38 20 89	kortep(a)gmail.com
22	St Michel-en-Grève	Hélène Dubois	02 96 35 73 06	helene22dubois(a)gmail.com
22	Rostrenen	Françoise Noireau	06 09 12 03 74	desirdapprendre(a)gmail.com
22	Dinan	Philippe Stride	02 96 27 87 43	<u>philippe.stride(a)wanadoo.fr</u>
29	Douarnenez	Chantal Allen	06 74 15 78 09	chantalallen9(a)gmail.com
29	Morlaix	Claudine Guégen	06 86 88 44 69	Esperantosolidareco(a)gmail.com
35	Rennes	Xavier Godivier	06 51 45 84 83	xgodivier(a)esperanto.org
35	Montfort-sur-Meu	Josette Ducloyer	06 35 32 02 00	jpducloy(a)gmail.com
35	St Malo	Anne-Marie Argney	02 99 40 24 86	amargney(a)wanadoo.fr
56	Hennebont	Yvette Veslin	02 97 36 08 75	herve.veslin(a)orange.fr
56	Lorient	Jean dit Yannick Le Guennec	06 78 59 98 56	jean.le-guennec(a)wanadoo.fr
56	Hennebont+Lorient	Claude Bensimon	06 22 08 29 32	cloesb(a)yahoo.fr
56	Pontivy	Marielle Giraud	02 97 27 76 98	liber.terre(a)wanadoo.fr
56	Rhuys	Francis Desmares	02 97 26 89 96	francismsg56(a)gmail.com
44	Nantes	Bruno Robineau	02 40 98 78 76	brobineau(a)orange.fr
44	St Aignan-de-Grand Lieu	Solange Goan	06 81 18 30 12	somigoan(a)gmail.com
44	Couëron	Luc Gouverneur	06 30 03 00 98	coueron-esperanto(a)orange.fr
44	Herbignac	Jean-Yves Santerre	02 40 88 96 98	jys.mys(a)club-internet.fr
44	St Nazaire	Chantal Barret	02 40 01 97 27	patchdomo(a)yahoo.fr

NB- "(a)" est utilisé à la place de "@" dans les adresses courriels données dans le VT pour éviter que ces adresses soient spammées suite à la diffusion du VT sur Internet.

On a pu faire des erreurs de copie, veuillez contrôler vos coordonnées et si vous constatez des erreurs ou changez de coordonnées, veuillez en aviser Josette Ducloyer. Merci d'avance !

Le VT sera diffusé par internet. Cependant, pour ceux qui désirent recevoir la version papier, certains clubs pourront l'éditer. Si vous désirez le recevoir **par la Poste**, s'adresser à :

Manjo Clopeau 02.90.73.37.10 manjo.clopeau[a]gmail.com 12 rue de la Drisse 56450 **Theix**

Rilate al heredaĵo

Malnovaj leteroj senditaj al Gaby Tréanton dum la jaroj 1946-49

Baldaŭ okazos omaĝo al Gaby, 5 jaroj post ŝia morto. Vi scias, ke ŝi multege korespondis kun esperantistoj (kaj aliaj) dum sia tuta vivo. Ŝi estis virtuoza pri korespondado. Ni ne plu havas la leterojn skribitajn de ŝi, sed ni ja havas tiujn, kiujn ŝi ricevis interŝanĝe.

Pro tio, kun la klubo de Lannion, ni komencis legi grandan amason da leteroj, kiujn mi konservis en mia domo. Ni elektis nur la leterojn skribitajn antaŭ la jaro 2000. Kelkaj el ili donas al ni ege interesajn informojn pri la ekonomia kaj politika etoso de tiu epoko. Ankaŭ ni ekscias pri kelkaj kutimoj en tia aŭ alia lando, pri la vetero, la ŝatokupoj de la korespondantoj, ktp.

Mi intencas proponi pecetojn de tiuj leteroj, kiel ekspozicio dum la post-tagmezo de dimanĉo 17a de marto. Vi ĝuos hodiaŭ en Verda Triskelo la freŝan novecon de tiu korespondado, precipe la plej malnovaj leteroj, tuj post la milito, kiam Gaby eklernis Esperanton.

Bonan legadon !

Maja Meriaux

Okazis...

Armor Esperanto en Dinano.

La klubo de Dinano invitis la membrojn de Armor Esperanto pasigi tempon en sia bela urbo. Granda tasko por la asocio, kiu devis trovi lokon – la Junlaborista Hejmo de Dinan – kaj organizi aktivaĵojn por tuta tago.

Sabate la 20-an de januaro, je la alveno matene, ni estis bonvenigitaj per varma kafo. La administra kunsido instalas sin en granda varma salono dum aliaj membroj malkovris esperantaj ludojn. Inter aliaj: « Hura ! Hove ! » kun kartoj pri la historio de Dinano, kreita de Alexandra, gajigis la ludantojn. Dek naŭ personoj ĉeestis por la komuna tagmanĝo. Armor Esperanto donacis aperitivan kaj reĝkukon kiel deserto. Kvin reĝoj ricevis la kronon...



Je 14.00 komenciĝis la vizitado de la malnova urbo, kie esperantistoj de Dinan ĉiĉeronis. La grupo promenis tra la urbo ĝis la Placo de la Turnirejo, kie staras belega statuo de Bertrand Duguesclin sur sia ĉevalo. Ni aliris la kastelon, fortegon kun ĉefturo, la turon de Coëtquin, la pordegon de Giĉeto kaj imponajn remparojn. La promonado forkondukis nin al la strato de la Horloĝo sed ni ne povis supreniri sur la turon de la Horloĝo, ni devos reveni ! Poste ni paŝis al la baziliko Sankto Savinto kaj piediris ĝis la haveno laŭ la rivero Rance. Ni daŭrigis la vizitadon suprenirante la faman pavitan straton de Jerzual. Fine ni reeniris al la Junlaborista Hejmo kie bedaŭrinde ne eblis prezenti Esperanton al la junaj laboristoj ĉar semajnfine ili restas hejme.



Dankon al Philippe kaj la membroj de la klubo pro neforgesebla tago !

Esperanto Rennes

Sabaton la 16-an de decembro 2023 tagmeze, la asocio Esperanto Rennes celebris la Zamenhofan feston ĉe la hejmo de Jannick en Cesson-Sévigné, apud Rennes. Ni estis 16 personoj, ne nur emeritoj sed ankaŭ junaj gepatroj kaj eĉ tri esperantistajn adoleskantoj, 11, 13 kaj 15 jaraĝaj, kaj kune ĝuis bongustan tagmanĝon en gaja etoso. Bedaŭrinde ne plu ekzistas kursoj en la sidejo. Tamen unu persono, kiu komencis la lernadon rete pere de ikurso kontaktis nin ĉar ŝi deziras, post la “virtualaj” esperantistoj, renkonti “verajn” esperantistojn.



ESPERANCE / REBELLION

Agado de niaj membroj

Jen informo de Laurent Peuch, kiu en loka radio bele parolis pri Esperanto . Uzu la ligilon, aŭskultu jaj ĝuu !

Amiko de mi kiu gvidas elsendon ("Portrait Sans Cible") en loka radio (COB FM) proponis al mi paroli pri Esperanto. Jen la rezulto:

<http://podcast.cobfm.free.fr/?p=15674>

... Kaj Okazos.

Pluezek anoncas :

Renkontiĝo en Pluezek la 6-an kaj 7-an de aprilo 2024

Sabate 6-an de aprilo

Je 11.00 Akcepto, informoj kaj aperitivo

Je 12.00 Manĝo el la sako

Je 14.00 ĝis 15.30 : ĝenerala kunveno de Armor Esperanto

Sabate vespere : Vespermanĝo en Paimpol

Sabaton kaj dimanĉon okazos kursoj, ludoj, legado, ekskursoj kaj prelegoj.

Gastoj :

- Verkistino Ewa Grochowska gvidos kurson
- Trigo ĉeestos
- Christiane Lamy ĉeestos por prezentado pri sia agado en Tanzanio kaj precipe prizorgo de handikapitaj infanoj.

Por aliĝi, bonvolu kontakti Noël : reyssetplouezec@hotmail.fr

Esperanto Vannes anoncas :



Avec *Esperanto - Vannes*

Venez fêter l'Esperanto

Familles et amis bienvenus !

DIMANCHE 24 mars 2024
12h - 17h salle des Alizés à Vannes

Rue de la Brigantine / Vannes 56000 (A côté de l'école de Cliscouët)
Maps : Salle des Alizés - Rue de la Brigantine, Vannes

<https://eventaservo.org/e/801dd2> - info@esperantovannes.fr

★ 12.00 Accueil - Apéritif offert par l'association

★ 13.00 Couscous / dessert
Couscous poulet-merguez ou végétarien
15 € / adulte, 8 € / enfant < 12 ans

N'oubliez pas vos couverts complets

★ 15.00 Après-midi animé avec
➢ Théâtre KIA TAGO !
➢ Quizz spécial rétrospective
➢ La Machine du congrès



Les bonnes volontés sont bienvenues pendant et après !

BULLETIN D'INSCRIPTION AU REPAS ZAMENHOF DU 24 mars 2024
à adresser à Erika Lohée, 11 allée des Tamaris, 56000 Vannes
avec votre règlement avant le 10 mars

NOM :

Réserve repas adulte x 15 € = repas enfant (< 12 ans) x 8 € =

Dont couscous poulet couscous végétarien

TOTAL = € par chèque à l'ordre de Esperanto-Vannes

N'oubliez pas vos couverts complets

Aranĝo : Hélène Dubois - 06-68-15-32-62 - helene22dubois@gmail.com - 14 chemin de Land Gily 22300 Saint Michel en grève :

Prolegado Chantal Allen - 06-74-15-78-09 chantalallen9@gmail.com korektado Josette Ducloyer jducloyer@gmail.com

N'attendez pas la prochaine édition, envoyez vos articles à Chantal dès maintenant pour les voir apparaître dans le prochain VT (par courrier ou par internet).

Eŭropa Kongreso

De la 8-a ĝis la 12-a de majo 2024 okazos la Eŭropa Esperanto-kongreso.



Jam pli ol 400 aliĝintoj ! Kaj vi ?

La ĉefa celo de la kongreso estas kunigi Esperanto-parolantojn. La aranĝo celas ankaŭ inviti loĝantojn de Strasburgo kaj de la ĉirkaŭaĵoj malkovri nian lingvon kaj kulturon.

Temo de la kongreso : Strasburgo tutmonda ĉefurbo de la libro. UNESCO nomumis Strasburgo-n Tutmonda ĉefurbo de la libro 2024. Estas la unua franca urbo, kiu estas distingita per tiu nomumo.

Programo : Prelegoj (interalie pri libroj, pri Eŭropo kaj paco), diversaj atelieroj, kursoj, preparo al KER ekzamenoj, interkona vespero kun Kajto, koncerto de Johny M, Kabareto kun Saša Pilipoviĉ.

Libroservo, speciala programo por junuloj.

Multaj ekskursoj proponataj: ekzemple Parlamentejo, Katedralo, Petite France, Biblioteko Sélestat, Alzaca muzeo, Neustadt, Monto Sainte-Odile, Obernai, Mulhouse, muzeoj (Trajno muzeo, muzeo Lalique kaj muzeo pri kristalo).

Lunde okazos postkongresa tuttaga ekskurso: vizito de Kolmaro, de tipa alzaca vilaĝo ĉe la vinŝoseo kaj de la kastelo Haut-Koenigsbourg.

Nepre vizitu la retejon <https://kongreso2024.esperanto-france.org>

Kandidatiĝu por la eŭropaj balotoj

La eŭropaj balotoj okazos la 9an de junio 2024.

Inter la 6-a kaj la 17-a de majo 2024 oni registru la liston de la kandidatoj.

La partio Europe-Democratie-Esperanto EDE bezonas volontulojn por fariĝi kandidatoj: 81 personoj, 50% virinoj kaj 50% viroj.

Se vi deziras kandidatiĝi, bonvolu skribi al contact@e-d-e.fr kun ĉi-subaj informoj:

*Nomo, adreso, telefonnumero, retadreso, aĝo...

* en kiu pozicio vi deziras esti sur la listo (komenco, mezo, fino, rezerve aŭ ne gravas)

* membreco al kiuj asocioj ?

* membreco al aliaj partioj ?

Pierre DIEUMEGARD prezentas **Laure PATAS D'ILLIERS**, listokapo de Europe Démocratie Espéranto por la eŭropaj balotoj, en francelingva artikolo sur e-d-e.fr : [Dans 5 mois, les élections européennes du 9... - Europe Démocratie Espéranto \(e-d-e.fr\)](https://e-d-e.fr)

Daniel Houguet

Adiaŭ Maryvonne !

Ĝis kenavo Maryvonne ! (Kiel ŝi ŝatis diri).

Ekde la komenco, Maryvonne partoprenis niajn Pluezekajn Renkontiĝojn.

Ĉiuj memoras ŝian dolĉan voĉon petante : volontuloj, venu kun mi al la vazar-ateliero !

Sed matene, ŝi sekvis iun kurson. Jen tio, kion ŝi travivis ene de sia grupo :

La gvidanto petis : bonvolu prezenti vin al la aliaj.

La najbaro de Maryvonne parolis pri sia profesio : mi laboras per « balaila tenilo ».

Maryvonne proponis : eble vi estas komunuma balaisto ?

Li, kun ironia rideto : ne konfuzu « balaila tenilo » kaj « stirstango »...mi estas aviadpiloto !

Laŭta, sincera ridego tuj spruĉis el la koro de Maryvonne... kaj baldaŭ lumigis ĉiujn vizaĝojn !

Maryvonne tiel ŝi estis : iomete naiva, sed sincera kaj tiom impeta !



Jeanne. Pluezek.



Fremdaj Vizitintoj

Trigo

Ekde 2001 la bretonaj esperantistoj havas privilegian rilaton kun la esperanto asocio de Wuhan (Ĉinio), ne pro la COVID..., sed pro la multnombraj kaj fruktodonaj interŝanĝoj inter niaj asocioj.

PENG Zengming, kies esperanta nomo estas “Trigo”, aperas kiel la pioniro de tiu interŝanĝo. Dumlonge li instruis esperanton en Wuhan kaj ankaŭ gastigis esperantistojn el la tuta mondo per la “Pasporta Servo”. En la jaro 2000, post sia partopreno en la Internacia Junulara Kongreso en Hong-Kongo, mia filino Karine gastis en lia hejmo kaj mi retskribis al li por danki. Poste ni korespondadis kaj en 2001 dum tuta monato mi organizis por li turneon tra Bretonio. Ĉiujare ĝis 2006 li vizitis nian regionon, ĉu sola, ĉu kun gelernantoj, okaze de la pluezeka renkontiĝo. Eĉ en 2006 li venis kun 6 gelernantoj...

En 2010 li denove turneis, ĉifoje kun sia edzino Lili. Ankaŭ lia filino Peonio (Nian) partoprenis plurfoje en la pluezeka renkontiĝo kaj eĉ je la 15a aĝo vivis dum tri monatoj ĉe bretonaj esperantistoj. Aroma, unu el liaj lernantinoj, vizitis Bretonion plurfoje, ĉu kun sia fratino Ruĝa, ĉu sola, ĝis la lasta restado en aŭgusto 2023.

Nuntempe, post la forpaso de Lili, Trigo ripozas ĉe sia filino Peonio (Nian), kiu loĝas en Tuluzo. En novembro 2023 li vojaĝis al Bretonio por viziti esperantistajn geamikojn en Montfort, Saint-Suliac, Couëron, St Aignan kaj Vannes.



Jen la raporto de Elinjo pri lia restado de 14a ĝis la 18a de novembro en Vannes:

“Trian fojon la Esperanta grupo de Vannes akceptis la Ĉinon Trigo.

Simpatia homo, parolema, scivolema kaj interesa, li bone konas Francion ĉar ofte vizitadas sian filinon loĝantan en Tuluzo.

Li restadis 4 tagojn, dum kiuj ni okazigis diversajn aferojn : promenadojn laŭ la marbordo, viziton al la merkreda bazaro kaj la mezepoka urbocentro, amikajn vesperojn, partoprenon en la loka internacia kafumejo, tagmanĝon en kresporestoracio, esperantan tuttagon kun poemoj, skeĉo, rakontoj, babiladoj, ludoj ..., viziton al esperantistoj de Herbignac sekvatan de gvidata malkovro de la sala marĉo de Guerande. Marielle el Pontivy, celanta verki artikolon por SAT-Amikaro, venis por intervjui lin.

Entute, tre agrablajn momentojn ni pasigis kun Trigo !”

Josette Ducloyer

Trigo PENG vojplano 2024

dato	nomo gastiganto	adreso	detaloj
12/03 vespere- 13/03 vespere	Anne-Marie Argney Amargney(a)wanadoo.fr	47 rue du Père Lebreton 35400 St Malo	Alveno mardon je 16h15 Foriro merkredon post la kurso (veturigo de Jannick)
13/03 vespere- 17/03	Jannick-Bert Huet-Schumann Huet.jannick(a)gmail.com	9 rue Couradin 35510 Cesson-Sévigné	Veturas la 13an al St Malo kaj la 17an al St Quay-Perros
17/03	Ĝenerala kunveno de la FEB kaj omaĝo al Gaby	St Quay-Perros	
17/03 vespere-21/03	Françoise Noireau Fransoazo(a)gmail.com	10B rue Le Hir 22110 Rostrenen	Veturado de St Quay al Rostrenen per Marielle Giraud
21/03-25/03	Yvette Veslin yvette.veslin(a)orange.fr	Kervach 56650 Inzinzac- Lochrist	
25-28/03	Maja Mériaux meriaux.family(a)wanadoo.fr	Kervoazel 22140 Bégard	Kurso en Lannion
28-30/03	Murielle-Jérôme Caré murielle.care(a)cloud.com	25 rue Louis Blanc 22590 Pordic	
30/03-02/04	Laurent Peuch-Amapola Ltpauch(a)hotmail.com	17,rue Léon Blum 22000 St Brieuc	
02/04-06/04	Chantal Allen chantalallen9(a)gmail.com	3 rue de Listrour 29100 Douarnenez	Prezentado en lingva kafejo en Douarnenez
6-7/04	Roger Eon	5 Kervilin 22470 Plouézec	6-7an de aprilo esperanta semajnfino en Pluezec


NB- "(a)" est utilisé à la place de "@" dans les adresses courriels données dans le VT pour éviter que ces adresses soient spammées suite à la diffusion du VT sur Internet.

Sumoo legado.

Ĉu vi partoprenas en la Sumoo Legado? Ĵen via spaco por komenti pri via legado.

Informoj pri Sumoo Legado: www.esperanto-sumoo.pl/

Marvirinstrato de Tim Westover



Ĉu marvirino ?

Kial mi ŝatis la novelon ?

- Pro la titolo : Mar-vir-in-strat-o. Ne forgesbla ekzerco por komencantoj, kiu malfermis al mi la mondon de Esperanta literaturo antaŭ kelkaj jaroj.
- Pro la kontrasto inter la mirinda libera mondo de la knabo, kiu velŝipas tra danĝeraj maroj kaj la taga rutino de la malfeliĉa patrino, kiu nur zorgas pri ordinaraj aferoj.
- La novelo Marvirinstrato vojaĝigas nin al fantazia mondo, samkiel 17 aliaj ege inspirigaj noveloj kiujn entenas tiu ĉi libro.

Legu kaj ĝuu !

Ŝanjo

Asocio Mazingira, historio de renkontiĝo.

Christiane Lamy kaj Maurice Foucher loĝas en Couëron (44) kaj ekde 2008 agadas en Tanzanio. Jen tri el iliaj agadoj.

1) Kreado de radio-stacio « Mazingira FM. »

Kadre de bretona turneo organizita de la FEB (Federacio Esperanto Bretonio), S-ro Mramba Simba Nyamkinde, la tiama urbestro de Salama, kaj la ĝis nuna prezidanto de la asocio Mazingira en Tanzanio, alvenis en Francion en 2008. Ni gastigis lin hejme, kaj, vidante la diversajn radio-ilarojn stokitajn en nia remizo, li havis la ideon instali komunuman radio-stacion en sia vilaĝo, kiu estus grava por tiu izolita kaj senkomunikila landparto. Por tion realigi, li petis de ni helpon, kaj proponis ke ni iru en lian vilaĝon por starigi ĝin.

En oktobro 2009, ni forflugis al Tanzanio. La radio-domo ne estis finkonstruita kiel planite. Dume, ni iris en diversajn urbojn por aĉeti la mankantajn materialojn, Ni vizitis plurajn lernejojn, dispensariojn, arbokulturejon..., kaj ankaŭ fabrikon de rulseĝoj, kiu dungis kaj daŭre dungas precipe albinojn.

Jaroj pasis, iom post iom « Radio Mazingira FM » disvolviĝis, kaj nuntempe, ĝi dissendas tra kvin regionoj, kaj laborigas dek unu personojn, kvin dungitajn kaj ses volontulajn.

Sed nia aventuro ne finiĝis tie.

2) Sendo de kontenero.

Ni kunvenis kun pluraj respondeculoj de la organizaĵo Mazingira kaj de Salama vilaĝaro. Dum niaj interŝanĝoj, ni demandis ilin : « Kaze de sendo de kontenero el Francio, ĉu vi materiale helpus la asocion Mazingira por ĝia ĝissurloka transportado? » Ili ne nur konsentis pruntedoni transportilon, sed ankaŭ antaŭpromesis ĝian senpagan tralandan veturadon.

Tiam, ni ne sciis ke prezentiĝos oportuno kelkajn monatojn poste!

Intertempe, pluraj familioj vizitis nin por peti helpon pri siaj handikapitaj infanoj. Tiel, nova neatendita projekto atendas nin en Francio!

3) La handikapitaj infanoj.

Dum nia restado en Salama, pluraj familioj vizitis nin kaj petis helpon pri siaj infanoj grave vunditaj aŭ handikapitaj. Plejparte el ili suferas pro kruraj misformiĝoj, kaŭzitaj, laŭ pluraj esploroj, de superdozo de kinino, preskribita kontraŭ malario. Kompata sento tuŝis nin antaŭ tiuj suferoj. Sed, kiel financi la operaciojn, sciante ke ĉiu el ili kostas averaĝe 300 aŭ 400 eŭrojn?

Post nia reiro en Francion, cele al akiro de monsubteno, ni prelegis en kelkaj urboj pri nia restado en Salama, kaj multaj homoj mone kontribuis por operaciigi John, dekvarjara junulo, grave brulvundita pro falo en fajro kiam li estis trijara. John estis la unua infano el venonta longa listo ...

Sed mono estas malfacile akirebla, kaj, porparte solvi tiun problemon, kun esperantista amiko Luc Gouverneur, ni trovis rimedon: partopreni pulbazarojn vendante surstrate diversajn ne novajn objektojn, kaj dediĉi la enspezojn al tiuj infanoj. En la komenco, ni prenis el niaj propraj ŝrankoj kaj tirkestoj diversajn ne plu uzatajn aĵojn kaj vendis ilin. Sed la tirkestoj kaj ŝrankoj ne estas senfundaj... Por helpi nin, jaron post jaro, amikoj, esperantistaj aŭ ne, kontribuis, aŭ mone, aŭ donacinte diversajn vendotajn aferojn.

Dank'al tiu interhelpo, kiu ankoraŭ nun daŭras, ni operaciigis tridekon da infanoj, kaj financis aĉeton de rulseĝojn fabrikitaj surloke, en fabriketo kiu dungas precipe albinojn.



En 2018, Maurice, Luc kaj mi kreis esperantan asocion « CELI » (Couëron Esperanto Langue Internationale), kies la dua statuta artikolo precizigas: « tiu asocio, nereligia kaj nepolitika, celas informi pri Esperanto, faciligi ties lernadon cele al interŝanĝo kaj solidareco inter esperantaj parolantoj tra la mondo. »

John, Joyce, Winfrida kaj la aliaj infanoj por kiuj lernejo estas nun alirebla, kiuj nun povas ludi kun aliaj infanoj, atestas pri tiu solidareco dank'al nia komuna lingvo, Esperanto, kiu ebligis kaj ebligas tiujn realigaĵojn kaj interŝanĝojn kun nia peranto-amiko Mramba Simba el Tanzanio.

Eblas monhelpi la asocion ĉi-sube.

Christiane LAMY – (33) 06 22 47 58 26 -
Christiane.lamy@cegetel.net

Asocio CELI 36 rue Jean Bart 44220 Couëron Tél. (33) 06 300 300 98 —

coueron-esperanto@orange.fr - www.coueronesperanto.blogspot.com —

Por tiuj, kiuj deziras scii pli multe, Christiane prelegos dum la pluezeka renkontiĝo de la 6-7a de aprilo

Farendaĵoj notindaj en via kalendaro



La 109-a Universala Kongreso
Aruŝo, Tanzanio
De la 3^a ĝis la 10^a de aŭgusto 2024

<https://uea.org/kongresoj>
<https://uk.esperanto.net/2024/>



Bonvenon en la kulturdomo Kastelo Grezyljono

AG de la FEB (matin)
Hommage à Gaby Tréanton (après-midi)
Dimanche 17 mars, St Quay-Perros

Rencontres et AG d'Armor espéranto



Plouézec

Samedi 6 et dimanche 7 Avril

Venez fêter l'Espéranto- Repas
Zamenhof
Dimanche 24 mars, Vannes



Eŭropa kongreso
En Strasburgo
De la 8^a ĝis la 12^a de Majo

Franca kaj germana ĉiujaraj
Esperanto-Kongresoj
Informoj :

<https://esperanto-france.org/congres-europeen-2024>

De la 12^a ĝis la 21^a de aprilo

12a Printempas

Intensivaj kursoj kaj ekzamenoj kun Marion Quenut, Korody Zsófia, Paweł Fisher-Kotowski, Ducan Charters.

De la 21^a ĝis la 26^a de aprilo

-Hora (korusa) renkonto kun Bernard Bigonnet
-Biciklaj promenoj kun Xavier Godivier BEMI

De la 5^a ĝis la 15^a de julio

-Maratona Esperanto-Kurzo kun Koutny Ilona, Radojica Petrovic, Andrea Bertrand
-Internacia E-konferenco post Osiek pri variaj temoj

De la 6^a ĝis la 16^a de aŭgusto

14a Festa semajno por infanoj kaj familioj kun Mikaelo Bronstejn, Alex Hunet, Larisa Osadčuk, Alain Delmotte.

De la 10^a ĝis la 16^a de aŭgusto

3a Someras kun Danko Ley, Ankica Jagnjić, Jean-Luc Kristos

Informoj en

<https://gresillon.org>